

Vojtěch Náprstek kaj Emil Holub

Oldřich Arnošt Fischer

Prelego por Esperantista Klubo Brno, filia societo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
la 26-an de februaro 2020

Ĉeĥaj elstaruloj Vojtěch Náprstek (1927–1894) kaj Emil Holub (1847–1902) – kion komunan ili havis? Ili ambaŭ travivis multe da aventuroj, estis grandaj filantropoj kaj patriotoj. Ili laboris en la 19-a jarcento, kiam niaj nacioj (ĉeĥoj, moravianoj kaj silezianoj) fariĝis evoluitaj eŭropaj nacioj enkadre de Aŭstrio kaj, de post la jaro 1867, enkadre de Aŭstro-Hungario (1867–1918).

En Praga Malnovurbo, proksime Betlehema kapelo, staras la domo U Halánků, kiun ekde la jaro 1826 la familio Fingerhut, ĉeĥe Náprstek, posedis. Náprstekoj estis entreprenantoj. Oni iam diras, ke Náprstekoj danke al patriotismo ĉeĥigis gemanan nomon Fingerhut. Sed tio ne estas vero. Ilia ĉeĥa nomo Náprstek estis germanigita nur ĉe unu viro, Antonín Náprstek, kiu, kaŭze de fervora germane parolanta pastro, estis baptita germane kiel Anton Fingerhut (1775). Vojtěch Náprstek uzis germanan kaj ĉeĥan verziojn kaj ekde la jaro 1880 nur la ĉeĥan verzion.

Patrino de Vojtěch Náprstek travivis malfacilan vivon, sed ŝi estis forta personeco. Anna Homová (1788–1873) estis filino de muelisto, sed ŝi baldaŭ perdis ambaŭ gepatrojn kaj fratinojn, devis forlasi hejmon kaj servi al geonkloj. Ŝi transvivis tifon. Ŝia unua edzo baldaŭ mortis kaj ŝi restis kun tri infanoj sola. Ankaŭ ŝiaj tri infanoj forpasis. En la jaro 1822 Anna denove edziniĝis. Ŝia dua edzo Anton Fingerhut (1775–1832) estis laborema bonkorulo. Tial geedzoj povis atingi propran entreprenon, bierfarejon, fabrikon por alkoholaĵoj kaj gastejon. Kun sia la dua edzo Anna havis du filojn: Ferdinand-on (*1824) kaj Vojtěch-on (*1826). Kiam Anton Fingerhut forpasis (1832), patrino de Vojtěch devis zorgi mem pri ĉio. La domo U Halánků fariĝis ne nur gastejo, sed signifa kultura centro, kie renkontiĝadis multe da praganoj. Anna Fingerhutová devis multe labori, sed ekzemple en la jaro 1870 ŝi kun 25 laboristoj ĉiutage gajnis 500 florinojn (nuntempe tio estus ĉirkaŭ 2 000 €). Ŝi fariĝis riĉulino, sed homoj ŝin amis, ĉar ŝi neniam forgesis, ke ŝi antaŭe estis nur servistino. Anna helpis al multe da homoj, ekzemple ŝi senpage al granda amaso de malriĉuloj panon disdonis.

Ambaŭ ŝiaj filoj, Ferdinand kaj Vojtěch, devis studi. Ili estis agemaj en ĉeĥa patriota movado. Ferdinand studis teĥnikon en Prago, sed pli juna Vojtěch revis pri filozofio. Li volis vojaĝi, ekscii tutan mondon. Pro sia intereso pri orientalistiko li eĉ ekstudis armenan lingvon. Krom tio li forlasis romkatolikan eklezion. Tio al lia patrino ne plaĉis. Ŝi devigis Vojtěchon studi iun pli praktikan disciplinon ol filozofio. Post longa traktado, en la jaro 1846, Vojtěch foriris en Vienon studi juron, por poste al sia patrino helpi kun entreprenado. Sed ankaŭ en Vieno li okupiĝis pli multe pri orientalistiko kaj diversaj patriotaj agadoj de vienaj ĉeĥoj ol pri studado de juro.

En la jaro 1848 li partoprenis en revolucioj, kiu okazis en Vieno kaj Prago. La revolucio en Prago estis nesukcesa, aŭstra generalo Alfred Windischgrätz (1787–1862) ĝin facile venkis. Multe da homoj poste timis de punoj. Vojtěch pro tio volis forlasi Aŭstrion kaj vivi en Usono. Li ne estis sola. Lia partnerino Kateřina Krákorová (1827–1888?) volis ankaŭ fuĝi. Vojtěch prunteprenis monon de ĉuj amikoj kaj konatuloj. Nur al sia patrino li diris nenion. Oni ofte opinias, ke Vojtěch forlasis sian hejmon kaŭze de timo de puno por sia partopreno en malvenkita revolucio, sed verŝajne grandajn rolojn ludis lia revo pri fremdaj landoj kaj precipe lia amantino, kiu volis lin akompani. Kateřina (kromnome Tinka [tjinka])

estis bela, 21-jara virino, modistino. Ŝi parolis germanan kaj francan, revis pri kariero de aktorino aŭ kantistino. Same kiel Vojtěch ŝi ŝatis liberecon kaj kondukis nekonforme.

La 23-an de oktobro 1848 sur bordo de velŝipo Leontine junaj geamantoj Vojtěch kaj Tinka sub komuna familia nomo Náprstek forlasis Eŭropon. La veturado daŭris preskaŭ du monatojn. Vojtěch sendis al ŝia patrino 30-paĝan leteron, en kiu li eksplikis, kial li forlasis hejmon (pri Tinka li ne skribis). La 17-an de decembro 1848 Vojtěch kaj Tinka elŝipiĝis en Novjorko. Vojtěch serĉis laboron, sed lia nova vivo en Usono feliĉe ne komenciĝis. Lia koleriĝita patrino nek respondis lian leteron, nek monon sendis. Vojtěch, kiu nur tre malmulte kaj malbone parolis anglan, multfoje devis ŝanĝi laborlokon. Kun Tinka li transmoviĝis en Novlondonon (en la ŝtato Connecticut), sed ankaŭ tie li kapablis trovi nur malbone pagitan laboron. Tial Vojtěch kaj Tinka translokiĝis en la urbon Milwaukee (en la ŝtato Wisconsin). Tie Vojtěch luprenis por 25 dolaroj per monato vendejon kun kelo, kie li kreis librovendejon kaj pruntan bibliotekon. En kelo ekfunkciis publika legejo kaj literatura kafejo. En Milwaukee loĝis multe da germanoj. Tinka kaj Vojtěch sciis germanan lingvon. Ekde la jaro 1852 Vojtěch ekeldonis germanlingvan ĵurnalon *Milwaukee Flugblätter*. Tinka al li helpis kaj baldaŭ estis konata kaj ŝatata. Bedaŭrinde ili ambaŭ multe laboris, sed ne gajnis sufiĉe da mono. Krom tio Vojtěch volis plibonigi siajn rilatojn al sia patrino. En la jaro 1851 li veturis en Eŭropon. Li ne povis viziti Aŭstrion, ĉar aŭstraj policianoj lin malliberigus, tial li nur renkontiĝis kun sia frato Ferdinand en Parizo. Lia patrino al li sendis 1 000 frankojn. Veturado reen daŭris 56 tagojn. La 25-an de februaro 1852 Vojtěch revenis en Usonon. Granda ŝoko por li estis la novaĵo, ke lia amantino Tinka dum lia foresto enamiĝis al germana kuracisto Gustav Aigner. Verŝajne ŝi timis de strikta bopatrino, sinjorino Anna Náprstková.

Post disiĝo de Tinka la situacio pliboniĝis. Anna Náprstková al Vojtěch sendis sufiĉe da mono. Vojtěch estis trista, kiam Katinka edziniĝis, tial li multe laboris, por forgesi. Lia ĵurnalo *Milwaukee Flugblätter* estis la unua ĵurnalo, kiun en Usono ĉeĥoj eldonis. Ĝi havis 5 500 legantojn. Vojtěch subtenis la ĵurnalon *Volksfreund*, kunaboris kun lerneja societo *Der Milwaukieer Schulverein* kaj aliaj germanaj societoj. Krom tio li ekkolektis folklorajojn. Lia kolekto de orienta literaturo poste estis la plej granda kolekto en Bohemio. Usonanoj eksciis, ke Vojtěch estas laborema kaj agema viro. Tial en la jaro 1855 li fariĝis publika notario. En la jaro 1856, enkadre de registara teamo, li vizitis indianajn teritoriojn en Minesoto kaj Norda kaj Suda Dakotoj. Li eksciis fierajn indianojn kaj estis ŝokita vidante bazaron kun nigraj sklavoj. En tiu tempo li ekkolektis etnografojn, inter la unuaj estis indiana diademo.

La 25-an de februaro 1858, post longtempa kaj atentema traktado kun aŭstraj oficistoj, li revenis en Bohemion. En Prago en la domo U Halánků li kreis legejon, kiun vizitis tiamaj elstaruloj. En la jaro 1859 politika situacio en monarĥio pliboniĝis, ĉar post malvenkita milito kontraŭ italoj kaj iliaj francaj helpantoj (apud Solferino, la 24-an de junio 1859) aŭstra ministro de interaj aferoj Alexander Bach (1813–1893) estis maldungita kaj nova konstitucio (1861) donis al loĝantaro kelkajn demokratajn ŝanĝojn. Ekzemple aŭstriaĵoj povis pli facile vojaĝi eksterlanden.

Ekde majo ĝis oktobro 1862 en Kensington (Grandbritio) okazis tutmonda ekspozicio. Vojtěch, kiu jan bone parolis anglan, aranĝis ekskurson de ĉeĥaj elstaruloj (ekz. František Palacký, František Ladislav Rieger, Jan Evangelista Purkyně, Karel Jaromír Erben k. a.) en Grandbrition. Ili trarigardis la ekspozicion kaj eksciis, ke Grandbritio, Usono kaj aliaj ŝtatoj estas pli progresemaj ol Aŭstrio. Kun entuziasmo ili kolektis monon, en Kensington aĉetis kelkajn eksponaĵojn kaj post reveno en Prago Vojtěch en Insulo Sĥelecký aranĝis ekspozicion (1862–1863).

Al virinoj li arde prelegis: „Ĉiu virino dum hejmlaboroj ĉiutage perdas meze kvar horojn da tempo. Dum unu jaro ŝi kaŭze de hejmlaboroj perdas 1 440 horojn. Kvindekjara virino perdis ok jarojn da sia vivo per ĉiutaga balaado, hejtado, gladado, lavado, kuirado ktp.“ – Vojtěch montris al vizitantoj de sia ekspozicio eltrovojn, kiuj ŝparas tempon kaj plibonigas vivkondiĉojn de hejmastrinoj. Praganinoj (ofte unuafoje en sia vivo) ekvidis modernajn lavmaŝinon, glaciŝrankon, polvosuĉilon kaj aliajn utilajn ilojn. Ili eksciis, ke en Novjorko jam funkcias akvokonduktilo – en Prago servistinoj devis iradi al publika akvofonto kaj transporti akvon hejmen. Tio al virinoj plaĉis. La unua paŝo al emancipado de virinoj estas ilia liberigo de pena permana hejma laboro.

La dua paŝo estas edukado de virinoj. En la 19-a jarcento ekzistis multe da antaŭjuĝoj kontraŭ virinoj, kies mondo estis limigita per germanlingva parolturno „*Kirche, Kinder, Küche*“ („Preĝejo, infanoj, kuirejo“). Edukitaj homoj volis sorton de la virinoj plibonigi. Ekzemple patrioto kaj filantropo Karel Slavoj Amerling (1807–1884) kun sia helpantino Bohuslava Rajská (1817–1852) fondis Societon de la Sinjorino Sankta Anna por edukado de pragaj virinoj. Amerling tion komentis per la sentenco „por ke virinoj fariĝu la homoj“ (en ĉeĥa originalo laŭvorte: „*aby z žen člověkové byli*“). Vojtěch aranĝis bibliotekon kaj legejon por virinoj. Ĉeĥa verkistino Karolina Světlá (1830–1899) admonis virinojn ne aĉeti multekostajn vestaĵojn por baloj, sed dediĉi tielmaniere ŝparitan monon al Ĉeĥa Industria Muzeo. En la jaro 1865 **Amerika Dama Klubo** (*Americký klub dam*) ekfunkciis. Dum traktadoj de la Klubo viroj devis restadi nur malantaŭ la pordo. La Klubo aranĝis prelegojn, ekspoziciojn kaj ekskursojn por virinojn. En la jaro 1866, dum prusa-aŭstra milito, klubaninoj kolektis tolaĵon kaj bandaĵojn por vunditaj soldatoj. Dum dudek jaroj la Klubo aranĝis ĉirkaŭ 500 prelegojn de 122 prelegantoj kaj 266 ekskursojn. La bibliotekon 85 000 da virinoj vizitis (33 vizitoj por la tago). Kompreneble la unuaj vizitantinoj de la Klubo estis la virinoj de meza kaj alta sociaj tavoloj, anstataŭ kiuj servistinoj faris hejmlaborojn. Amerika Dama Klubo ne estis oficiale registrita. Kiam aŭstroj malpermesis agadon de la Klubo (1870), ĝi nur ŝanĝis sian nomon: Eksa Amerika Dama Klubo kaj kontinuus sian laboron. Inter centoj da vizitantinoj de la Klubo estis ekzemple dr-ino Anna Bayerová (1852–1924), la unua ĉeĥino, kiu fariĝis kuracistino (en Svisio), Klementina (Klemeňa) Hanušová (1845–1918), instruistino de gimnastiko, kaj Charlotte Garrigue-Masaryková (1850–1923), edzino de la unua ĉeĥoslovaka prezidento Tomáš Garrigue Masaryk (1850–1937).

En la jaro 1873 forpasis patrino de Vojtěch. Li povis malfermi Industriian Muzeon kaj edziĝi (1875). Lia edzino fariĝis Josefa Křížková (1838–1907), kiu estis laboristino de entrepreno de patrino de Vojtěch. Ili ne havis proprajn infanojn, sed adoptis kvin orfaninojn, pri kiujn ili zorgis.

Vojtěch Náprstek ne interesiĝis pri politiko. Li estis ateisto, sed amikiĝis kun pastroj kaj pastoroj. Antaŭ morto li volis esti ne entombigita, sed kremaciita. Tiam tio estis granda novaĵo. Dr-ino Anna Bayerová al li helpis trakti kun posedanto de krematorio en la urbo Gotha (Germanio, Turingio).

En la jaro 1894 Vojtěch Náprstek eksuferis de cerbuma atako kaj post tri tagoj, la 2-an de septembro 1894, forpasis. Ĉerko de Vojtěch Náprstek estis pertrajne transportita en la urbon Gotha, kie li, kiel la unua ĉeĥo, estis kremaciita.

Industria Muzeo ricevis lian nomon: **Muzeo Náprstek** (*Náprstkovo muzeum*). En kolektoj de la muzeo kontribuis multe da vojaĝantoj kaj aliaj elstaruloj: Emil Holub (1847–1902), Josef Kořenský (1847–1938), Enrique Stanko Vráz (1860–1932), Antonín Frič (1832–1913), Bedřich Hrozný (1879–1952), Julius Zeyer (1841–1901), Alberto Vojtěch Frič (1882–1944) k.a.

Doktoro Emil Holub (1847–1902)

Unu el la kontribuantoj de industria Muzeo (Muzeo Náprstek) estis ĉeĥa kuracisto, vojaĝanto, kartografo, etnografo kaj filatelisto doktoro Emil Holub. Li naskiĝis kiel filo de kuracisto la 7-an de oktobro 1847 en bohemia urbeto Holice. En la jaro 1857 la familio Holub translokiĝis en Pátek nad Ohří. Bonega studento, kiu legis librojn pri skota vojaĝanto David Livingstone (1813–1873), ŝatis en sia libera tempo kolekti diversajn interesajn. Lia studenta kolekto enhavis ekzemple 300 arĥeologiaĵojn, 2500 fosiliojn, 800 anatomiaĵojn, 1000 minaĵojn kaj mineralojn kaj pli ol 3000 insektojn. En infaneco li estis influita de ĉeĥa vojaĝanto, kolektanto de orkideoj Benedikt Roetzl (1823–1885). En mezlernejo en Prago Emil Holub estis diligenta, sed ne tre sukcesa studento, precipe pro sia malbona scio de germana lingvo. Li estis pli sukcesa en Mezlernejo en Žatec. Poste li studis medicinon en Prago, la studadon li sukcese finis en la jaro 1872. Jam dum sia studado li en Prago konatiĝis kun Vojtěch Náprstek. Ambaŭ viroj amikiĝis kaj Náprstek Holubon eĉ finance subtenis.

En la 19-a jarcento eŭropaj ŝtatoj havis koloniojn, el kiuj alportis produktojn kaj krudmaterialojn. Aŭstrio (ekde la jaro 1867 Aŭstro-Hungario) ne havis uzeblajn koloniojn. Nur aŭstra ekspedicio de Julius Payer (1841–1915) la 2-an de novembro 1873 proksime norda poluso malkovris la insularon Lando de Imperiestro Francisko Jozefo la 1-a, kies la plej norda insulo havas nomon de krona reĝido Rudolfo. Sed ankaŭ civitanoj de Aŭstro-Hungario signife kontribuis al scio de la mondo.

La unua vojaĝo en Afriko (1872–1879)

La 18-an de majo 1872 juna ĉeĥa kuracisto Emil Holub pertrajne veturis en Rotterdemon, perŝipe en Harwich kaj pertrajne en Londonon. La 25-an de majo 1872 li sur bordo de vaporŝipo Briton veturis el Southampton en Kaburbon (suda Afriko). La veturado daŭris 37 tagojn. Jam survoje li provis kolekti flugantajn fiŝojn. La 3-an de julio 1872 Holub elŝipigis en Port Elizabeth. La veturado el Southampton en Port Elizabeth (inkluzive de dogano) kostis 575 florinojn (ĉirkaŭ 2300 €).

Holub neniam antaŭe skribis taglibrojn, sed jam dum veturado li la taglibron fondis. Ĝis tiu tempo li kutimis skribi nur germane, sed sian taglibron li skribis ĉeĥe, kvankam tio por li estis malfacila. Same kiel aliaj tiamaj ĉeĥaj patriotoj (ekz. Karel Havlíček Borovský, Božena Němcová, Bedřich Smetana) Holub origine estis edukita germanlingve. tial li ne estis kutimita verki ĉeĥlingve. Skribante en sia gepatra lingvo (ĉeĥa lingvo) li pene serĉis taŭgajn ĉeĥajn esprimojn. Se li verkis artikolojn kaj felietonojn, li uzadis germanan lingvon kaj amiko Náprstek en Prago ilin ĉeĥigis kaj sub la nomo de Holub publikis.

En Port Elizabeth kaj poste en Dutoitspan (nuntempa antaŭurbo Beaconsfield en Kimberley), kie oni minis diamantojn, Holub verkis kiel kuracisto. El Dutoitspan Holub faris sian unuan afrikan ekspedicion (ekde la 18-an de februaro 1872 ĝis la 7-an de aprilo 1873). Li kun tri gvidantoj, unu ĉaro, kvin ĉevaloj kaj kvin hundoj trapasis la riveron Valo (*Vaal*). La ekspedicio estis sukcesa kaj Holub printempe en la jaro 1874 sendis al Náprstek en Pragon 21 kestojn kun kolektitaj materialoj. La ekspozicio (1.-8. novembro 1974) estis tre sukcesa, ĉar homoj ne havis multe da informoj pri Afriko kaj estis scipovaj, kion ilia samlandano tie trovis.

Holub volis baldaŭ prepari la duan ekspedicion. En suda Afriko jam li havis amikojn, kiuj al ili helpis. Lia la dua ekspedicio (ekde la 3-an de novembro 1873 ĝis la 7-an de aprilo 1874). Li vizitis orientan randon de Kalahari Dezerto kaj la urbon Ŝoŝongo. Li kolektis kvardek kestojn de materialoj.

Ankaŭ lia tria ekspedicio (ekde la 2-an de marto 1875 ĝis la 25-an de novembro 1876) estis tre fruktodona, kvankam ĝi feliĉe ne finiĝis. Holub alvenis al la rivero Zambezo

kaj desegnis **la unuan mapon de ĉirkaŭaĵo de Viktoria Akvofalo**. Kun indiĝenoj li provis boatveturi, sed havis akcidenton. En ondoj de la rivero Zambezo mortis kelkaj indiĝenoj. Taglibroj kaj parto de kolektoj de Holub estis perditaj.

La 28-an de aŭgusto 1878 Holub ekveturis hejmen. Li revenis la 17-an de oktobro 1879. Tiam li ankoraŭ ne sciis, ke lia patro mortis. En Eŭropo Emil Holub estis admirata. Li publikis artikolojn kaj librojn. En la jaroj 1879–1883 li faris 139 prelegojn en Aŭstro-Hungario, Grandbritio, Germanio kaj ricevis invitojn de kelkaj aliaj ŝtatoj.

La dua vojaĝo en Afriko (1883 – 1887)

Multe da homoj volis partopreni en lia venonta ekspedicio en Afriko. El 700 adeptoj Holub elektis ses la plej bonajn virojn. Ili ĉiuj devis majstri minimume du metiojn kaj estis eksaj soldatoj. Kiuj estis tiuj viroj?

Josef Špíral (1845–1886) – moraviano el Štáhlavy, meblisto; li mortis de malario en Afriko;

Karel Bukač (+1886) – ĉeĥo el Vieno, forĝisto; li mortis de malario en Afriko;

János Fekete – hungaro el Csongrád, radofaristo;

Ignaz Leeb – hebreo el Harmansdorf, lignaĵisto;

Antonín Halouzka (Holub nekorekte skribis Halouška)(1860–1901) – moraviano el Čeladice (nuntempe paro de Rajhrad u Brna) – ŝuisto, selisto, seruristo, pafilisto; li estis kiel malsanulo, sendita en Eŭropon; li mortis en Vieno;

Osvald Söllner (+1886) – buĉisto el Vieno; li estis murdita de maŝukulumboj en Afriko.

La 2-an de novembro 1883 Holub edziĝis kun **Růžena Hofová** (1865–1958), kiu lin akompanis en Afrikon. Ŝi estis bela, brava, bona pafistino. En Afriko ĝi ne povis porti nepraktikajn longajn jupejn, verŝajne ŝi eĉ pantalonon portis, sed sur bildoj, kiujn desegnis ŝia edzo Emil Holub, ŝi ĉiam havas longajn jupejn laŭ strikta modo de la 19-a jarcento, kiam virino devis montri al viroj eĉ ne sian maleolon.

La 20-an de decembro Holub kun sia edzino elŝipiĝis en Kaburbo (*Cape Town*). La ekspedicio celis al fontoj de Nilo. Fakte ĝi finis en nuntempa Zambio. Bovkastratoj de la ekspedicio veneniĝis per venenaj plantoj. Neniu el ekspedicianoj protektis sin kontraŭ pikado de kuloj, ĉar tiam homoj ne sciis, ke la kuloj transmittas malarion. Oni kredis, ke malbona aero kaŭzas malarion.

Nur en la jaro 1880 franca kuracisto Charles Louis Alphonse Laveran (1845–1922) trovis en ruĝaj sangaj ĉeloj de malsanuloj evoluajn stadiojn de sanga parazito, la protozoo el la genro *Plasmodium* (filumo Apicomplexa, klaso Aconoidasida, ordo Haemosporida, familio Plasmodiidae). En la jaro 1902 angla kuracisto Ronald Ross (1857–1932) ricevis Nobel-premion por klarigo de vivciklo de kaŭzantoj de malario. Seksa evoluo de la parazito okazas en kulo de la genro *Anopheles*, neseksa evoluo okazas en ruĝaj sangaj ĉeloj (eritrocitoj) de homoj. Kiam amaso da parazitoj forlasas la ruĝajn sangajn ĉelojn, pacientoj suferas de febro. *Plasmodium falciparum* kaŭzas neregulajn febrajn atakojn, *P. ovale* kaj *P. vivax* kaŭzas la febron regule post ĉiuj tri tagoj kaj *P. malariae* post kvar tagoj. La malsano damaĝas precipe hepaton, renojn, kaj malfortigas organismon.

Indiĝenaj portistoj ofte ribelis, iam ili eĉ ŝtelis enhavojn de portataj valizoj. Josef Špíral kaj Karel Bukač mortis de malario proksime de Viktoria Akvofalo (1886). Malsana Antonín Halouzka estis sendita hejmen kun kestoj.

Holub estis la unua eŭropano, kiu vizitis teritorion de maŝukulumboj. La 2-an de aŭgusto 1886 maŝukulumboj atakis tendaron de Holub apud la vilaĝo Galogonga. Ili mortigis Söllneron, neniigis kolektojn kaj taglibrojn.

Holub kun sia edzino kaj du ekspedicianoj devis retiri. Ĉiuj suferis de malario kaj aliaj tropaj malsanoj. Survoje Ignác Leeb estis vundita de leopardo. Holub kun sia edzino serioze malsaniĝis.

Post reveno en Aŭstro-Hungarion Holub aranĝis du grandajn ekspoziciojn (1891 en Vieno, 1892 en Prago). Multe da vizitantoj alvenis, sed finance la agadoj ne estis sukcesaj. Kolektoj de Holub enhavis preskaŭ **31 milojn da eksponaĵoj**. Kiam li transportis sian ekspozicion el Vieno en Pragon, li bezonis **82 fervojajn vagonojn**. Post ekspozicio li vane serĉis taŭgan lokon por la eksponaĵoj. Li dediĉis multe da eksponaĵoj al Industria Muzeo, Muzeo de Bohemia Regno, sed ankaŭ al diversaj societoj kaj lernejoj. Tio estis la plej trista afero, ĉar mondfama sciencisto Emil Holub disdonis siajn valorajn afrikajn kolektaĵojn al homoj, kiuj ilin ne kapablis estimi kaj ne sciis pri ili zorgi. En la jaroj 1894–1896 Holub prelegis en Usono. Lia lasta prelego (1901) temis pri anglo-bura milito (1899–1902).

Emil Holub estis ankaŭ granda filatelisto. En februaro 1899 li fariĝis membro de Klubo de Ĉeĥaj Filatelistoj. Lia privata kolekto de poŝtmarkoj estis unu el la plej grandaj kolektoj en Aŭstro-Hungario. En la jaro 1902 ĝi enhavis 17 310 poŝtmarkojn kaj pli ol 18 000 da varietoj.

Emil Holub forpasis la 21-an de februaro 1902 en Vieno, kie li estas entombigita.

Lia ekspedicio, kiu tragike finis en teritorio de maŝukulumboj, estis temo de la filmo „*Velké dobrodružství*“ („La Granda Aventuro“) kun Otomar Krejča (1921–2009) kaj Antonie Hegerlíková (1923–2012) en ĉefaj roloj (1952). En ŝercaj sekvencoj Emil Holub kaj lia edzino aperis ankaŭ en filmo de Ladislav Smoljak „*Jára Cimrman, ležící, spící*“ („Jára Cimrman, kuŝanta, dormanta“) el la jaro 1983 (Holub – Jiří Zahajský (1939–2007), Růžena Holubová – Nina Divíšková (*1936)).

Amerika Dama Klubo funkciis ĝis majo 1941. En la jaro 1942 la klubo ekfunkciis sub la nomo Dama Klubo Náprstek en Prago (germane: *Naprstek's Damenklub in Prag*). Regulaj renkontiĝoj ekokazis en la jaro 1947 (sub la origina nomo). Post sukcesa puĉo de ĉeĥoslovakaj komunistoj (la 25-an de februaro 1948) estis la klubo preparita por neniigo. La 30-an de aprilo 1950 Amerika Dama Klubo estis neniigita. Socialisma reĝimo de soveta politika satelito, kiu tiama Ĉeĥoslovakio estis (1948-1989), toleris neniun opozicion, kaj timis edukitajn kaj progresemajn virinojn. En la jaro 1996 la Klubo denove ekfunkciis.

Rekomendita literaturo

- BAUM, J. 1955: Holub a Maŝukulumbové. Kapitoly o největším českém cestovateli. 1-a eld. Prago, Nakladatelství Československé akademie věd, 127 paĝoj.
- DANIEL, M. 1985: Tajné cesty Smrtonošů. 1-a eld., Prago, Mladá fronta, 264 paĝoj.
- FISCHER, O.A. 2012: Kuloj. Prelego por Esperantista Klubo Brno, la 19-an de septembro 2012. – www.literatura.bucek.name/brno//fischer-kuloj.pdf
- FISCHER, O.A. 2013: Alberto Vojtěch Frič. Prelego por Esperantista Klubo Brno, la 5-an de junio 2013. – www.literatura.bucek.name/brno//fischer_alberto-vojtech-fric.pdf
- FISCHER, O.A. 2018: Jiří Baum (1900-1944). Prelego por Esperantista Klubo Brno, la 4-an de aprilo 2018. – www.literatura.bucek.name/brno//fischer_jiri-baum.pdf
- FISCHER, O.A. 2020: Buraj militoj. Prelego por Esperantista Klubo Brno, la 15-an de januaro 2020. – www.literatura.bucek.name/brno//fischer-Burske-valky_200117.pdf

- HAMMAN, J. 1965: Po stopách Divokého západu. 1-a eld., Prago, Státní nakladatelství krásné literatury a umění, n. p., 191 paĝoj.
- HĽADÍK, P. 2012: Africké muzeum dr. Emila Holuba, Holice / The African Museum of Doctor Emil Holub in Holice. 1-a eld., Holice, Kulturní dům města Holice, 88 paĝoj.
- HOLUB, E. 1973: Cesta do země Mašukulumbů. 1-a eld. Prago, Mladá fronta, 255 paĝoj.
- HORA-HOŘEJŠ, P. 2007: Toulky českou minulostí, 11-a volumo. 1-a eld., Prago, Via Facti, 222 paĝoj.
- HORA-HOŘEJŠ, P. 2012: Toulky českou minulostí, 13-a volumo. 1-a eld., Prago, Via Facti, 221 paĝoj.
- JINDRA, Z. 2011: Emil Holub – cestovatel a sběratel poštovních známek. - <https://www.infofila.cz/emil-holub-cestovatel-a-sberatel-postovnich-znamek-r-2-c-4184> .
- REINHARDT, Z. 1998: První kolekce Náprstkovy sbírky v Národním technickém muzeu, paĝoj 29-31. In: HOZÁK, J. (ed.): Vojta Náprstek a muzejnictví. 1-a eld., Prago, Národní technické muzeum, 38 paĝoj.
- SACHS, R. 1995: Nebezpečí tropických nemocí, 1-a eld., Dobřichovice, Kava-Pech, 33 paĝoj.
- SECKÁ, M. 1998: Vojta Náprstek – zakladatel Českého průmyslového muzea (Náprstkova muzea všeobecného národopisu), paĝoj 22-25. In: HOZÁK, J. (ed.): Vojta Náprstek a muzejnictví. 1-a eld., Prago, Národní technické muzeum, 38 paĝoj.
- SECKÁ, M. 2012: Americký klub dam. Krůček k ženské vzdělanosti. 1-a eld., Prago, Národní muzeum, 348 paĝoj.
- ŠÁMAL, M. 2013: Emil Holub, cestovatel, etnograf, sběratel. 1-a eld., Prago, Vyšehrad, 464 paĝoj.
- ŠIKL, J. 1981: Legendy o Divokém západě. 1-a eld., Prago, Práce, 224 paĝoj.
- ŠKUBALOVÁ, M. 2014: Osobnost Vojty Náprstka a zrod ženského hnutí v Čechách. (Diploma laboro). Liberec, Tehnika Universitato, Nature-Homama kaj Pedagogia Fakultato, 115 paĝoj.
- ŠOLLE, Z. 1994: Vojta Náprstek a jeho doba. 1-a eld. Prago, Felis, 255 paĝoj.